

ILEI sciigas

Charlotte Burton (Usono) parolos en la Reto ; iu ajn povas sekvi ŝian prelegon per ZOOM

Jen ŝi prezentas sian prelegon :

« La unua okazos je la 4a decembro (mardo) je la 8a ptm laŭ la orienta (usona) horzono. Ĝi temos pri "Socia Justeco kaj Lingvo Edukado" kaj okazos per Zoom. Je la fino de la unua retseminario, mi publike anoncos la tagon, tempon, kaj temon de la dua. La retseminario okazos la 4 decemro je la 8a ptm (UTC -5).

La evento okazos per ESF, ne per ia alia institucio. Mi estas la sola prelegonto.

Ĝi celas instruistojn de Esperanto.

Mi prezentos ĝin al ĉia ajn publiko, kia interesiĝus. La tuta afero estas reta, do ĝi estos videbla al ĉiu ajn, kiu interesiĝas pri la temo. ESF diris, ke mi prezentu retseminariojn, kiel parto de stipendio, kiun ili donis al mi pli frue ĉi-jare. La celo estas, ke mi povos riparoli tion, kion mi lernis pri lingvo-instruado, al aliaj Esperanto-instruistoj. Mi prelegas pri socia justeco kaj lingvo edukado,

Aliĝi per komputilo, tabletkomputilo, aŭ poŝtelefono:

Bonvolu alklaki la jenan ligilon por aliĝi. <https://zoom.us/j/187776181>

Aŭ aliĝi per telefono:

Telefonnumero (por pli bona kvalito, uzu numeron laŭ via loko):

Usono: +1 669 900 6833 or +1 646 558 8656

Webinar ID: 187 776 181

Internaciaj numeroj haveblaj: <https://zoom.us/j/187776181> »

Elkore salutas

Mireille Grosjean

Prez. de ILEI